OLE

Al ĉiuj recenzoj el el Esperanto
sub la Suda Kruco

Al ĉiuj recenzoj

Al ĉefpaĝo Originala literaturo

# La fotoalbumo, dua volumo

**TREVOR STEELE:** *La fotoalbumo, dua volumo*. Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 2005. 165p., broŝ.

La unua volumo de ĉi tiu biografia romano aperis en 2001. Ĉi tiu volumo temas pri la epoko de la Vjetnamia milito, kaj ĉefe rolas la vivoj de Sean kaj David O'Shea. Se necesas izoli la ĉefajn temojn, eblas diri ke ili estas:

(1) La vjetnamia milito, kaj la divido de la fratoj O'Shea kiun ĝi kaŭzis: Sean, "viktimo" de la usonaŭstralia propagando pormilita; David, fervora kontraŭmilita agitanto; Bernie, kiu en la koro de sia animo rifuzas mortigi (li malamas fiŝkaptadon, ĉar li malamas mortigi fiŝojn – kio kaŭzas problemojn, ĉar ne nur la patro, Paddy, sed preskaŭ ĉiu alia persono en la romano amas fiŝkaptadon) – sed malgraŭ tio li akceptas soldatiĝi por la vjetnamia milito, ĉar tio estas "lia devo".

(2) La prireligia disputo en la familio O'Shea: David estas fervore kontraŭ-religia; la patro Paddy estas ĝenerale senreligia; la ceteraj familianoj, inkluzive de la edzinoj, varias inter gradoj de religia fanatikeco.

(3) La laboroproblemoj, kaŭzitaj de la ekmalsaniĝo de la patro Paddy, kaj la neceso de la ceteraj familianoj ne nur lin mem prizorgi, sed ankaŭ lian segistan entreprenon.

Sed la kvalito kiu elstarigas la talenton de Trevor Steele estas ne la temoj.

Ĝi estas la humana kapablo senti kaj prezenti la animojn de la priverkatoj. Lia nekonvencia maniero prezenti tion lokigas lin inter la majstroromanistoj. Jes, li ja kapablas verki bonajn intrigojn (nur vidu la klimakson de lia romano *Neniu ajn papilio!);* tamen tio estas vere flankafero. La historio konsistas el personoj, kaj la agojn de la personoj instigas iliaj personaj spertoj, kredoj, fantazioj, emoj, sentoj – ne ia fikcia "scienco'; ĉu marksisma, ĉu merkatisma, ĉu teologia, ali-isma aŭ -ologia – kaj la vera vivo konsistas el tiuj personoj. Neniu priskribo de la historio estas aŭ objektiva aŭ subjektiva, ĝi estas la pensoj kaj agoj de antaŭaj personoj, kiel ilin vidas la menso kaj memoro kaj kompreno de la verkanto. Tion tre elegante esprimis Steele en la komencaj paĝoj de *Neniu ajn papilio,* kaj li plene pravas.

Multarilate, La fotoalbumo estas spegulo de Aŭstralio dum la 1960-oj, kiel ĝin konis Trevor Steele.

Ĉu vi ĝuos *La fotoalbumon?* La fotoj en ĝi estas vortofotoj, ne vidofotoj. Ĉu vi, kun la verkinto, povas unue percepti, pervorte, la eksteran aspekton de evento, kaj poste esplori la internon de la evento por kompreni ĝin? Mi esperas ke jes. Ĉu vi konsentos kun la aŭtoro pri la Vjetnamia Milito, religiaj temoj, ĉiutagaj rilatoj inter familianoj? Mi ne scias. Sed por mi *La fotoalbumo* estas historia romano kiun mi ne volus mankigi al mi.

*La fotoalbumo dua volumo aĉeteblas ĉe Trevor Steele, 52 Exmouth Road, Glanville* SA *5015. La prezo*

*estas $25 + afran*ko.

---

Trevor Steele

La fotoalbumo